

por « LA SAGO », organo de SATamikaro

Temo : Memlernado kaj ekstera helpo

Eklerni lingvon estas granda aventuro. Estas malfermo al aliaj horizontoj, tio valoras eĉ pli, kiam la celata lingvo estas esperanto.

La lernado konsistas el diversaj aspektoj : lernado de vortoj, de strukturoj, de gramatikaj reguloj. Eklerno de nova prononcmankiero, de novaj sonoj. Ekaŭdo de ili. Legado, skribado. La intelekta laboro enkapa estas granda, diversa. Kiam oni la unuan fojon lanĉas sin en konversacion, temas pri impresa sperto.

Nuntempe oni povas lerni en klubo, dum kurso, aŭ memstudi antaŭ la ekrano de sia komputilo. www.lernu.net kaj www.edukado.net ebligas tion (eble ekzistas ankoraŭ aliaj...). En ĉiuj variantoj de lernado oni foje trovas sin sola kaj pensas pri la lernitaĵoj, ekz. dum promenado, dum iu simpla manlaboro, sub la duŝo, ktp. Tiu pripensado estas tre grava, tre valora ; pri ĝi mi deziras iom paroli hodiaŭ.

Tiu enkapa pripensado ebligas rediri al si vortojn, regulojn, frazojn, esprimojn, ... similas al maĉado de maĉgumo ! Tamen la maĉitaĵo prenas ĉiam pli da gusto, male pri gumo ! Oni konstruas al si mem frazojn : « Se mi deziras diri tion, mi eble dirus :..... » Vi tuj vidas : oni restas en certa neklareco. Pro tio endas havi profesoron aŭ progresan samideanon, al kiu oni poste povas diri : « Mi pensis pri tiu frazo, ĉu ĝi ĝustas ?? Ĉu oni povas diri tion tiel ?? » Do gravas la « ludado » per novaj nocioj en la kapo en soleca momento, same gravas, ke oni povas submeti tiujn eltrovitaĵojn al fakulo. Se ne, oni povas resti en eraro dum longa tempo. Kiam oni sekvas kursojn, oni rapide povas trovi la profesoron kaj diri al li/ŝi la eltrovitajn strukturojn. Same ĉe perretaj kursoj : oni ricevas korektanton, al kiu oni povas submeti la elpensitajn frazojn. Oni povas verki tekston, kiu entenas ilin, sendi la tekston kaj ricevi korektojn. TIEL ONI PROGRESAS !!

Mireille Grosjean